

ESPERANTO

sub la suda kruco

decembro 2025





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 32[4] numero 160 decembro 2025

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktisto: Terry Manley

Provlegantoj: Donald Rogers, Trevor Steele, Nicole Else

Kunordigisto: Jonathan Cooper

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruc estas sendata al membroj de la Aŭstralio Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZE).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocio:

AEA: esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZE: esperanto.org.nz / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruc

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

1a de februaro 2026

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2025 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj

ISSN 2207-0087

SUR LA KOVRILLO: *Aŭklando, urbo de la venonta aŭstralio kaj nov-zelanda kongreso kaj somerkursaro*



ENHAVO

Antaŭparolo	04
Kion vi ne scias pri Aŭklando?	05
La knabino kun la longa hararo (7)	06
Ĉinaj kunmetitaj vortoj	08
Respondoj al “interesa demando pri A.I.”	09
Ni perdis Svetislav Kanacki	11
Solidareco, egaleco, diverseco ĉe la IJK	12
Malbonŝancaĵoj en Indonezio	15
John Shaw Neilson – aŭstralia poeto	17
Poeziangulo – Jan Dean	20
La arto desegni	21
SAT-kongreso 2025	26
Cele al pli sana medio	27
El la regionoj	28
Krucvortenigmo	29
Kongreso kaj Somerkursaro 2026	30

Ekde junio 1989 esperanta radio-programo disaŭdiĝis el la etnokomunuma kaj multkultura radio stacio 3ZZZ en Melburno. Komence dum 15 minutoj, 1990 ĝis 1995 dum 30 minutoj, kaj post 1995, dum unu horo. Svetislav Kanacki estis la motoro pri tiu grava sukceso. Malgraŭ malfacilaĵoj pri la akcepto de Esperanta programo per la konsilantaro de la radiostacio, Svetislav klopode strebis dum monatoj por certigi, ke la Esperanta grupo elsendu programon per la nova etna radiostacio. La konsilantaro de 3ZZZ konsideris ke, ĉar Esperanto ne apartenas al iu lando, esperantistoj ne povas esti vera komunumo. La celo de 3ZZZ estas provizi radioelsendojn al etna grupo, kiu parolas specifan lingvon kaj kies membroj kune povas esti konsiderataj kiel komunumo.


En 1990, kun la helpo de eksjuĝisto Kep Enderby, Svetislav povis konvinki la konsilantaron de 3ZZZ, ke Esperanto ja estas aparta lingva komunumo, kiu indas elsendi programon. Ekde tiam, Esperanto estas aŭdebla radie en Aŭstralio.

Dum la jaroj, multaj melburnanoj helpis pri la programo. Inter ili estis Errol Chick, Harrold Beechy, Hang Cho, Ken Rolls, Zelimir Pehar, Tris Raouf, Esther

Parris, Heather Heldzingen kaj Brian Belcher. Laszlo Farkas, Alan Bishop, Karlo Egger, Marcel Leereveld, Jennifer Bishop kaj Franciska Toubale deĵoris dum periodoj de pli ol dek jaroj. Ekde 2016, Matthew Englezos daŭre helpas foje en la monato kaj en la kulisoj pri la tekniko. Svetislav retiriĝis en 2005 de sia rolo kiel kunvokanto.

Estas kuraĝige rimarki, ke Franciska Toubale kaj Heather Heldzingen, kun la helpo de junuloj William Georgeson kaj Brendan Price, daŭrigas la programon nuntempe. Certe plaĉus la Svetislav scii tion.

Sed la Esperanta programo daŭras nur pro subtenantoj kaj donacoj. Ni bezonas almenaŭ 40 esperantistajn membrojn en la 3ZZZ-a komunumo por resti en la listo de radioelsendaĵoj. Do jen la adreso por membriĝi: 3zzz.com.au/membership

Ĉiun jaron 3ZZZ havas periodon de monpetado, dum kiu aŭskultantoj donacas. Jam okazis por 2025. La moncelo de la Esperanta grupo por tiu periodo estas \$1000. Se vi ne donacis en 2025 kaj ne deziras maltrafi la sekvan periodon en 2026, sendu vian mondonacon al AEA pere de Heather Heldzingen. Kaj aŭskultu: 3zzz.com.au/shows/esperanto 



En la studio de 3ZZZ

Kion vi ne scias pri Aŭklando?

DAVID RYAN (VELINGTONO)

La venonta kuna kongreso kaj somerkursaro okazos en Aŭklando en januaro 2026. Jen kelkaj ne bone konataj faktoj pri la urbo.

1. Kvankam la plej granda urbo en Nov-Zelando, kun proksimume unu triono de la nacia loĝantaro, Aŭklando ne estas la ĉefurbo. La unua ĉefurbo estis Russell, malgranda vilaĝo norde de Aŭklando kiu, je la komenco de la moderna historio de Nov-Zelando, estis la ĉefa loko de eŭropa setlado. Tamen, Russell troviĝis en tro izolita, fora, nefacile atingebla loko, pro kio Aŭklando estis la dua ĉefurbo en 1841–1865. Pro plendoj de politikistoj en la Suda Insulo, kiuj ne plu volis fari longan vojaĝon al Aŭklando en la norda parto de la Norda Insulo, la ĉefurbo translokiĝis en 1865 al Velingtono en la centro de Nov-Zelando.
2. Nov-Zelando havas ses internaciajn flughavenojn, sed Aŭklando havas la plej gravan, kun pli ol 75% de ĉiuj internaciaj flugoj. Unu el la plej longdaŭraj flugoj en la mondo estas de Aŭklando al Daŭho, ĉefurbo de Kataro (17 horoj).
3. Aŭklando estas tre multkultura urbo, kaj celurbo por proksimume 60% de enmigrantoj al Nov-Zelando. Laŭ la rezultoj de la popolnombro de 2023, 31% de la loĝantaro de Aŭklando estis de azia deveno, 17% de la pacifikaj insuloj (precipe el Samoo), kaj 12% maoria.
4. Same kiel inter Melburno kaj Sidnejo, estas rivala rilato inter Aŭklando kaj Velingtono. Fakte, oni ofte ŝercas ke Aŭklando ne estas vera parto de Nov-Zelando. Sude de Aŭklando estas montetaro, kiu nomiĝas Bombay Hills. Oni ofte parolas pri tiu montetaro kiel landlimo inter du apartaj landoj.
5. Aŭklando kaj Queenstown (en la suda parto de la Suda Insulo) estas la du regionoj kun la plej altaj domprezoj. La meza domprezo en Aŭklando estas nun NZ\$1,2 milionoj (proksimume AU\$1,0 milionoj).
6. Mondkonata simbolo de Aŭklando estas la Ĉielturo (Sky Tower) kun alteco de 328 metroj, la 28a plej alta turo en la mondo. La turo havas kelkajn restoraciojn kaj oni povas viziti la plej altan nivelon por fari belajn fotojn de la urbo.
7. En 2026 Aŭklando havos subteran urbcentran trajnan sistemon. Oni preskaŭ finkonstruis la Urban Cirklan Trajnvojon (City Rail Link), kiu konektos du nun apartajn vojojn. Dank' al ĉi tiu nova konekto, trajnvojaĝoj al la urbcentro estos multe pli rapidaj kaj estos konstruitaj du novaj stacioj en la urbcentro.
8. Kromnomo por Aŭklando estas la "Urbo de Veloj" pro la granda haveno kun multaj velŝipoj. La nov-zelanda mararmeo havas sian ĉefan ŝipbazon en Aŭklando.
9. En 1840 la urbo ricevis sian anglan nomon pro la 1a Grafo de Aŭklando, George Eden, kiu estis amiko de William Hobson, la unua brita guberniestro en Nov-Zelando.
10. Multaj aŭstralianoj verŝajne konas la nomon de Eden Park. Tiu estas la plej granda sporta stadiono de Nov-Zelando, kie nia nacia rugbea teamo oftege gajnas kontraŭ la aŭstralia teamo. 



Elĉerpaĵo 7 el membiografio de Catherine Gluck: La knabino kun la longa hararo

TRADUKITA DE TERRY MANLEY (ARMIDALE, NSK)

Iom pri la verko: En 2023, kiam mi vizitis Esperanto-Domon en Sidnejo, mi rimarkis sur tablo libreton neimponan. Trafoliante ĝin, oni ne trovas ligan al Esperanto escepte, ke Kep Enderby verkis la enkondukon por ĝi. Mi memoras la nomon de la aŭtorino, ĉar en la 1990aj jaroj ŝi heredigis sufiĉe grandan sumon al la Esperanto-Federacio de NSK. Do mi portis la libreton hejmen kaj post legado pensis, ke valoras traduki ĝin memore al Catherine Gluck.

Catherine naskiĝis en Hungario en 1906 kaj emigris Aŭstralion en 1950. Jen iom el la traduko.

Mi iĝis poŝtmarka brokantisto

Ĉio, kion mia edzo faris, interesis ankaŭ min. Li estis filatelisto kaj mi ofte akompanis lin al la Filatela Klubo. Poste lia intereso estis pri numismatiko (kolekto de moneroj), sed mi ŝatis poŝtmarkojn kaj iĝis kolektisto de raraj, valoraj poŝtmarkoj. Pro la persekutado de la judoj, iliajn valoraĵojn oni konfiskis. Mi havis proksimume 14–15 albumojn plenajn de raraj poŝtmarkoj deponitaj en sekuran deponskatolon ĉe la banko. Ĉio en la sekura deponskatolo malaperis.

Iun tagon mi havis kuraĝon peti al S-ro Kertész liberigi min de mia posteno en la

posttagmezo, ĉar mi deziris partopreni la filatelistan kunvenon. S-ro Kertész afable petis min iru al lia apartamento unue, kaj petu al la dommastrino donu al mi skatolon de sur lia skribtablo, kiu enhavis kvanton de jam uzataj poŝtmarkoj. Li diris al mi, ke li ne estas filatelisto, kaj konservis la poŝtmarkojn sencele. Mi alprenis la skatolon de poŝtmarkoj, portis ĝin hejmen, kaj lavis kaj ordigis la poŝtmarkojn. La filatela klubo estis ene de la Poŝtmarka Interŝanĝa Domo, kiu situis en bela tri etaĝa konstruaĵo ĉe Andrásy ut Numero 1. Ĝi konsistis el kelkaj grandaj haloj, kun antikva meblaro, pezaj dekoraciitaj kurtenoj, lustroj, remburitaj seĝoj kaj molaj persaj tapiŝoj sur la plankoj. Nur membroj rajtis eniri. Iuj konis min, kaj invitis min membriĝi.

Mi havis poŝtmarkojn ne tre valorajn. Mi opiniis, ke mi sciis nemulte pri poŝtmarkoj. Je iu kunveno paro disputis pri la identeco de iuj poŝtmarkoj. Ili petis al mi, kiel spertulo (ĉu?), solvi sian disputon. Surprize, estis facile por mi identigi la poŝtmarkojn pri kiuj ili disputis. Tiam unu el ili sugestis, ke mi havigu al mi rajtigilon kiel brokantisto, ĉar estis malmultaj tiaj komercistoj en Budapeŝto tiam. Plej multaj el tiuj perdiĝis dum la milito. Personoj kiel mi, kiuj mirakle postvivis, pro prioritato



facile ricevis rajtigilon kiel brokantisto. Baldaŭ mi iĝis la unua brokantistino pri poŝtmarkoj en Budapeŝto je tiu tempo. Inflacio estis grandega. Ĉiun tagon ni plene okupiĝis pri la elspezo de nia mono, ne gravas kion ni aĉetis, ĉar post tago la mono ne eĉ aĉetus skatolon de alumetoj. (Flanke: alumetoj estis inventaĵo de Miklós Irinyi, hungaro.)

Ĉiun tagon, la poŝta departemento devis presi kaj elsendi novajn poŝtmarkojn kun pli kaj pli da nuloj aldonitaj al la valoro. La aktualaj banknotoj estis ofte superpresitaj per pli da nuloj aldonitaj. Multaj el la poŝtovicistoj estis filatelistoj kaj konis min. Frumatene mi iris al diversaj poŝtoŝtancoj por mendi 5, 10, aŭ 20 mil poŝtmarkojn. Kiam mi revenis posttagmeze por kolekti la poŝtmarkojn, la mono senvaloriĝis. La poŝtovicistoj, kiel amikoj, ricevis profiton de mi. Post kelkaj semajnoj, mi havis grandan kvanton de folioj kun centoj de nove presitaj poŝtmarkoj sur tiuj, konservitan en mia apartamento.

Je tiu tempo, ne estis saĝe negoci per mono. Ĉio baziĝis sur interŝanĝa sistemo kaj la baza interŝanĝilo plej ofte estis unu kilogramo da graso por kuiri. Mi ankaŭ laboris pri la kontkalkuloj de malgrandaj entreprenoj, kiel hartondistoj kaj butikoj kun unu vendisto, kaj ricevis pagon per kilogramoj da graso. Mi sufiĉe enspezis tiam por aĉeti aĵojn por plibonigi mian domon.

Rimarkinda sperto mi devas rakonti: Iuj brokantistoj vendis poŝtmarkojn kontraŭ nur usonaj dolaroj. Tio estis kontraŭleĝa kaj punita per enkarcerigo. Iun tagon la policanoj invadis la filatelan centron. Neniu havis permeson eliri. Mi estis la unua (ĉar mi estis ina) kontrolata. Ili ne povis trovi usonajn dolarojn sur mi. Ili liberigis min kaj mi marŝis al la elirejo.

Mi komptis al miaj kamaradoj, kiuj, mi sciis, havis usonajn dolarojn. Marŝante laŭ la vico de miaj kamaradoj, mi diris laŭte; "Mi bezonas poŝtukon, ĉu iu povas prunti unu al mi?" Ĉiuj sciis kion fari. Ili metis siajn dolarojn en poŝtukon, kaj ĵetis tiun en mian mansakon. Mi eliris rapide. Alveninte hejmen, mi metis ĉiun poŝtukon en la banujon. La sekvan tagon ili alvenis kaj kolektis siajn poŝtukojn. Mi savis ne nur ilian monon sed ankaŭ iliajn vivojn. Ĉu vi povas imagi kiel la edzinoj, patrinoj kaj parencoj kisadis min?

Mesaĝo de la Ruĝa Kruco

Tamen nenio kompensis kontraŭ la manko de mia frato. Mi sopiris kontakti lin, sed ne povis. Mi ne eĉ sciis kie li estis. Surprize, iun tagon mi ricevis leteron per la Ruĝa Kruco kun lia pariza adreso. Tuj mi pretigis leterojn adresitajn al mia frato en Parizo, kaj portis tiujn, esperante ke mi renkontos iun irantan okcidenten. Ĉiun tagon mi disdonis iujn el tiuj leteroj al iu ajn, kiun mi pensis kapabla kaj volonta alpreni ilin. Ne estis telefona aŭ poŝta servo preter la landlimo.

Estis francaj soldatoj en Budapeŝto, kiuj provis reveni al Francio. Mi petis, per nebona franca, al unu de la soldatoj sur la strato, alpreni mian leteron kaj poŝti ĝin en Francio tuj post lia reveno. Mi iom riskis, sed ĉifoje sentis, ke mia letero trovos vojon al Francio kaj mia frato.

Multajn jarojn poste, Fred diris, ke li ricevis tiun leteron perpoŝte. Tuj li iris per ĵipo al la sendadreso por scii pli da detaloj. La junulo surpriziĝis pro usona soldato, kiu parolis perfektan francan, sed ne povis doni pli da informo ol, ke la letero estis de sinjorino, kiu donis ĝin al li en strato en Budapeŝto. **E**

Ĉinaj kunmetitaj vortoj: ĉu ratoj havas poŝojn en la ĉina lingvo?

NICOLE ELSE (SIDNEJO)

Mi demandas min kia estus Esperanto se Zamenhof bone sciintus la ĉinan lingvon. Ĉu Esperanto havus ankoraŭ malpli da radikoj? Ĉu ni vere bezonas radikojn kiel “salivo”? Ĉu ne pli facile diri “buŝakvo” kiel la Ĉinoj? Ĉu ni bezonas la radikojn “vulkano”, ĉu ne sufiĉus la vorto “fajromonto”? Zebro estas bānmǎ (strioj-ĉevalo). Gramatiko estas lingv-regulo. Aviadilo estas flugi-maŝino. Nu en Esperanto ni ja povas uzi “flugmaŝino” precize kiel la ĉinoj. Globuso estas tero-pilko.

Vi ne bezonas lerni radikojn por la


vorto ŝaltilo kiel necesas en la angla kaj multaj lingvoj. Ĝi simple estas ŝaltita-malŝaltita. Vi ne bezonas lerni radikojn por grandeco, ĝi estas granda-malgranda. Kio estas stetoskopo en la ĉina? Ĝi simple estas aŭskulti-ekzameno-ilo. Kiel la Ĉinoj diras “komputilo”? “elektro-cerbo”? Kio estas fero-bovo? Traktoro. Vetero estas “tago-aero”.

Do, la ĉina lingvo ja havas ege multajn kunmetitajn vortojn. Multaj vortoj en la ĉina havas nur unu silabon, do kunmetitaj vortoj tamen estas ege mallongaj, ofte nur du silaboj. Mi listigis interesajn

Vortelementoj	Ĉina	Eparolo	Traduko
bona + manĝi	好吃	hào chī	bongusta
elektro + cerbo	电脑	diàn nǎo	komputilo
fero + bovo	铁牛	tiě niú	traktoro
acida + lakto	酸奶	suān nǎi	jogurto
aero + pilko	气球	qì qiú	balono
tero + pilko	地球	dì qiú	globuso
poŝo + rato	袋鼠	dài shǔ	kangurua
urso + kato	熊猫	xióng māo	pando
floro + parko	花园	huā yuán	ĝardeno
mondo + lingvo	世界语	shìjiè yǔ	Esperanto
fajro + monto	火山	huǒ shān	vulkano
mano + maŝino	手机	shǒu jī	poŝtelefono
flugi + maŝino	飞机	fēi jī	aviadilo
buŝo + ruĝa	口红	kǒu hóng	lipŝminko
buŝo + akvo	口水	kǒu shuǐ	salivo
buŝo + manĝi	口吃	kǒu chī	balbutado
granda + persono	大人	dà rén	plenkreskulo
granda + malgranda	大小	dà xiǎo	grandeco
movi + afero	动物	dòng wù	besto
mem + movi	自动	zì dòng	aŭtomata
mem + iri + veturilo	自行车	zì xíng chē	biciklo
flava + oleo	黄油	huáng yóu	butero
publika + ĝardeno	公园	gōng yuán	parko
frapi + litero	打字	dǎ zì	tajpi
timiga + drako	恐龙	kǒng lóng	dinosaŭro
ĉielo + ansero	天鹅	tiān'é	cigno
kato + kapo + aglo	猫头鹰	māotóuyīng	strigo
kunligita + vestaĵo + jupo	连衣裙	liányīqún	dress
aŭskulti + ekzameni + ilo	听诊器	tīngzhēnqì	stetoskopo
linioj + ĉevalo	斑马	bānmǎ	zebro
cerbo + sako	脑袋	nǎodai	kapo
tago + aero	天气	tiānqì	vetero
flor + botelo	花瓶	huāpíng	vazo
lingvo + regulo	语法	yǔfǎ	gramatiko
fajro + kruro	火腿	huǒtuǐ	ŝinko

kunmetaĵojn kiel “poŝo + rato”. Kion tio signifas? Jes, kanguruojn kompreneble. Kaj rimarku, ke la ĉinoj nomas Esperanton la monda lingvo.

Krome, la numeraloj en la ĉina estas kiel en Esperanto; ekzemple 43 “kvar-dek-tri”, vi simple kunmetas la vortojn por la bazaj numeraloj por havi pli grandajn numeralojn.

Sube estas bildo de la vorto “kangurua” en la ĉina. 



Respondoj al “interesa demando pri A.I.”

En Esperanto sub la Suda Kruco 159 (septembro 2025), Trevor Steele demandis:

“Ŝajnas, ke nun inter junuloj estas opinio, ke ne plu necesas lerni lingvojn ĉar, dank’ al Artefarita Intelektulo (A.I.), baldaŭ ekzistos aparatoj, kiuj tuj tradukos el iu ajn lingvo en alian. Des malpli necesas lerni internacian lingvon. Kiel esperantistoj reagu al tiu opinio?”

Jen tri respondoj:

WILLIAM GEORGESON (MELBURNO)

Mi aŭdis de multaj homoj, ke ili kredas ke artefarita-intelektaj (AI-aj) tradukiloj estos malbonaj por la kresko de nia lingvo, kaj la lernado de aliaj. Komprenoble, se oni ne bezonas lerni lingvon por kompreni tekston, filmeton, aŭ eĉ homon antaŭ vi, kial oni lernus lingvon? Tio ankaŭ efikus sur Esperanton, ĉu ne? Mi parte konsentas, sed ankaŭ malkonsentas. Certe, homoj ĉiam serĉas manierojn fari ĉion pli facile, kaj tio, laŭ mia opinio, ŝanĝos la nombron da homoj, kiuj lernas la plej grandajn lingvojn en la mondo.


Multmultaj homoj en la mondo, kiuj ne tiom interesiĝas pri lingvo-lernado mem, lernis la anglan ĉar ili *bezonis* lerni ĝin. Ĉu vi konas eĉ unu homon de alia lando, kiu lernis la anglan pro intereso pri la lingvo aŭ kulturo mem, pli ol kiel ilo por labori, aŭ kiel multaj junuloj, por spekti Jutubajn filmetojn kiam tia homo estis tre juna?

Jutubo nuntempe fakte ŝajne havas ilon por traduki la sonon de tuta filmeto – kvankam nun tio ne estas tre ofta, sed mi divenas, ke tio ŝanĝiĝos en la estonteco, kaj pli kaj pli oni povos ja sperti ĉion per la denaska lingvo.

Mi kredas ke tio ja signifos, ke malpli da homoj lernos la anglan kaj aliajn lingvojn. Kiom, mi ne scias. Tamen, ĉar ne plu estos bezono lerni ĝin, certe malpli farus. Homoj nur studus lingvon pro volo, ne bezono.

Ĉar homoj aprezas manfaritajn aĵojn pli alte ol amase produktitajn aĵojn, mi ne dubas, ke homoj ankoraŭ aprezos rektan interageton sen tradukila aparato. Sed en mondo, kie neniu lernus alian lingvon pro bezono (kiel la angla), eble tio estus pli kaj pli malfacila.

Eble refoje la mondo estos en stato, kie mankas al ĝi komuna lingvo, sed ĉi-foje kun modernaj rimedoj lerni kaj komuniki kun homoj ĉie en la mondo. Kaj ĉi tie estas kie troviĝas mia malkonsento: jam, neniu havas bezonon lerni Esperanton. Ĉiuj, kiuj decidas lerni la lingvon, havas siajn kialojn, sed unu el la plej oftaj kialoj estas ke ĝi estas facila. La allogo de tio, kaj ĝia jam ekzistanta tutmonda komunumo, eble allogos pliajn homojn decidi studi Esperanton.

Ĉi-foje, ĉar la mondo havas la interreton, homoj povus uzi la lingvon ĉiutage en komunikado en la reto, same kiel homoj en aliaj mondoj uzas la anglan ĉiutage en la reto, sed apenaŭ en la reala vivo. Certe tio estas tre optimisma vidpunkto por Esperanto, sed eĉ se la novaj tradukiloj ne tiom efikos sur la mondo, mi kredas, ke malpli da bezono por lingvolernado ne ŝanĝos ion ajn pri Esperanto, kaj nia komunumo ajnokaze daŭre kreskos, kiel nuntempe. 

ANDERS ERNEST (SPRINGWOOD, NSK)

Mi estas junulo (21-jaraĝa), kaj mi havas multajn amikojn, kiuj interesiĝas pri lingvoj. La ideo, ke ni junuloj pensas, ke “ne plu necesas lerni lingvojn” estas malvera. Mi havas ankaŭ amikon, kiu studas A.I. en universitato – li preferas lerni lingvojn per la rekta metodo aŭ per (ne el) libroj. Lerni lingvojn estas por ni ne nur rimedo por legi librojn aŭ vidi filmojn. Oni povas trovi tradukojn de la plej granda parto de la internacia kultura heredaĵo, tiel ne necesas lerni lingvojn! Ĝi estas por ni amuzaĵo, metodo fari kontaktojn interkulturajn kaj, vere, farinda en si mem.

Laŭ mi ankaŭ ne eblas, ke A.I. povas traduki kulturaĵojn – aŭ nian esperantlingvan kulturon aŭ la diversajn kulturojn de tiuj, kiuj parolas esperante (ni ĉiuj estas dukulturaj aŭ multkulturaj, ĉar ni havas pensmanieron – por tiel diri – de la esperanta kulturo kaj de la propraj kulturoj.) Por esprimi kaj kompreni

vidpunktojn kaj pensmanieron, oni devas havi interkulturan scion. Tiel-nomata “A.I.” havas nenian scion, nek interkulturan nek alian. Ĝi povas nur resumi iomete da retaj informoj.

Kiam iu provas uzi A.I. por pli bone kompreni legaĵojn, tiu scias pri la multaj misaĵoj, kiujn ĝi kreas. Ni junuloj scias, ke A.I. estas vere malbonega (kaj eble aĉa) komprenilo de lingvoj kaj de kulturoj, kaj se ni volas havi plibonajn interkulturajn kontaktojn, lerni lingvojn (de kiu Esperanto estas unu de multaj) estas vere pli bone.

Multaj el ni (inkluzive mi) opinias ankaŭ, ke A.I. estas tiel malbona por la klimato kaj por niaj mensoj. Ĉar ĝi estas fondita sur la ŝtelo de verkoj artaj kaj beletraj, sed ankaŭ de la tutaĵo de la reto, inkluzive niajn skribaĵetojn, oni devus (pensante pri la krimoj de ĝiaj kreintoj) neniam uzi ĝin. **E**

MARC SCHMIDT (KANBERO)

A.I.-tradukado povas esti utila, sed ĝi ne povas konkursi kontraŭ realaj homoj parolantaj unu kun alia, kiu estas esprimo de amikeco, amo, emocio, aŭ homeco.

Mi volas iri kun vi por kafo, ne ĉar mi bezonas kafon, aŭ ĉar mi bezonas informon el vi (tamen mi ja eble volas havi ankaŭ ambaŭ aferojn). Mi ĉefe volas iri kun vi por kafo ĉar mi volas pasigi tempon kun vi, ĉar mi ŝatas vin.

Mi estas instruisto en elementa lernejo. Unu el miaj lernantoj havas avinon, kiu ne povas kompreni la anglan lingvon, nur la ĉinan, sed ŝi volas partopreni en la edukado de sia nepo. Do ŝi parolas al sia poŝtelefono ĉine, kaj la poŝtelefono tradukas la vortojn por mi, kaj inverse.

Tamen unufoje, kiam ni komunikis tiamaniere, ĉine parolanta instruisto alproksimiĝis, kaj la avino parolis kun tiu. La A.I. ne povis konkursi kontraŭ la ĉine parolanta homo.

(Tiu rakonto memorigas min pri la *33 Feliĉaj Momentoj* de ĉina verkisto Ĵin Ŝentang. #24 estas: “Vojaĝanto revenis hejmen post longa vojaĝo kaj vidas la antikvan urbo-pordegon kaj aŭdas la virinojn kaj infanojn sur ambaŭ riverbordoj parolantajn per sia propra dialekto. Aĥ, ĉu tio ĉi ne estas feliĉo?” Jes, tio ja estas feliĉo.)

Gepatroj de lernantoj, kiuj ne povas skribi la anglan, fojfoje flue skribas retroŝte al mi per A.I. Mi ne povas esti ĉiam 100% certa, sed laŭ mia scio, estas

ia "io", kio distingas A.I.-skribadon de homa skribado, por denaska parolanto. Mi opinias ke tiu "io" estas la kora ligado inter skribanto kaj leganto. Sed foje estas malfacile distingi, ĉu estas A.I.-a aŭ homa skribado. Tamen estas bone, ke iu povas komuniki pli bone skribe, ĉu ne?

Krome komputiloj povas helpi tiujn, kiuj povas nek paroli nek skribi, ke ili faru ambaŭ, ekzemple pri Profesoro Stephen Hawking.

Antaŭ mil jaroj, neniu portis okulvitrajn, sed nun oni povas vidi "okulvitrajn" ĉiam. Sammaniere, antaŭ dek jaroj oni ne vidis sendratajn orelhelpilojn (la blankaj aferoj en homaj orelotruoj, kiuj havas formojn de komoj). Sed nun oni povas vidi homojn kun orelhelpiloj ĉie – sur la trotuaro, en la tramo, en la superbazaro... ĉie! Tiuj aparatoj povas traduki fremdlingvon tuj,

eĉ kun vigla, homeca voĉo! Ja similas la universala tradukilo de la televida programo *Star Trek*. Pri legado: estas ja simpla afero celi vian telefonon al teksto, aŭ signo, kaj fari bonan, tujan tradukon!

Tiu igos (jam igas?) ŝanĝojn pri privateco kaj pudoro: Eble oni ne plu parolos private per ties denaska lingvo en publika loko, ekzemple la trajno. Aŭ – bonvolu konsideri! – antaŭ jaroj, restoracioj kun hundo-viando en Sud-Koreio ne rajtis (laŭleĝe) havi signon en la angla, nur en la korea, ĉar nekoreoj eble nek ŝatus nek komprenus tiun aspekton de korea kulturo. Sed nun, pro A.I.-tradukiloj, tiu baro estas kaj senpova kaj malnoviĝinta!

Eble tio estas bona afero? **E**

Ni perdis aktivan membron kaj amikon, Svetislav Kanacki

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

La 4an de oktobro 2025 telefonis min Gordana, la filino de Svetislav, por anonci, ke ŝia patro forpasis la antaŭan matenon: la 3an de oktobro.

Svetislav naskiĝis en vilaĝo de Vojvodino, Ban-Aradjelovo, apud Boĉar kaj Kikinda, Jugoslavio (hodiaŭa Serbio) la 16an de februaro 1926. Li ne multe studis, ĉar en tiu tempo disleksio ne estis rekonata de la instruistoj. La lernanto simple ricevis la etikedon de maldiligentulo, pigrulo, kio tre ĉagrenis Svetislav. Li ĉiam montris sin aventurema, intelekta aparta, scivolema. Kiel defio al si mem, li skribis aŭtobiografion, eldonitan libroforme en 2016 (nur unu ekzemplero). Svetislav estis eĉ aŭdaca – ekzemple kiam,

dum la milito, li decidis iri al la germana laboroficejo de Petrovgrad por plendi pri la estro, kiu vangofrapis lin pro neobeo al arbitra ŝanĝo de liaj laborkondiĉoj. Lia kuraĝo savis ne nur lin, sed ankaŭ la tutan vilaĝon de la netolerebla aŭtoritato de la vilaĝestro, kiu ne nur devis pagi monpunon, sed estis sendita al la fronto.

Svetislav fariĝis tajloro kaj, tuj post diplomiĝo, forlasis sian familion, malgraŭ la milito, kun la intenco malkovri la mondon. Li renkontis sian edzinon, Zora, kiam li vivis en Rijeka. En 1954 naskiĝis filino, pro kiu li ne restis en Aŭstrio, kvankam li estis elektita de la estraro de la kooperativo, kune kun la kontisto, por vojaĝi al Vieno. Sed nelonge poste,

Daŭras sur paĝo 25 >

Solidareco, egaleco kaj diverseco ĉe la Indonezia Junulara Kongreso

BRADLEY STEELE (MELBURNO)

“Antaŭ tiom da jaroj tiuj ŝipoj ne alvenis, kiel kelkaj diras, por invadi. Ili ne alvenis por rompi aŭ rabi. Simile al la klopodoj de SpaceX, la firmao de Elon Musk, viroj sur boatoj alvenis ĉe la rando de la konata mondo por komenci novan eksperimenton – novan eksperimenton kaj novan socion. Kaj same kiel astronautoj alvenontaj sur Marso, tiuj unuaj ekloĝantoj estis alfrontataj per malsama kaj stranga mondo plena de danĝero, aventuro kaj potencialo.”

– Sussan Ley [Suzan’ Li],
Aŭstralia Tago/Invadotago 2025

Diris tion la unua ina estro de la federala opozicio (la Liberala Partio) Sussan Ley, dum Aŭstralia Tago ĉi-jare. Eĉ mi, kun mia nekredema sinteno rilate al konservativismaj politikistoj, sentis min iom ŝokita, kiam mi vidis ĉi tiun parolon sur Jutubo baldaŭ post nia nacia tago. Tiam, kaj ankaŭ nun, mi esploras ekloĝan koloniismon por mia

doktoriĝa disertacio, kaj ĉiam estas malfeliĉa afero por mi kiam mi vidas, ke la sintenoj de aŭstralia koloniismo daŭre vivas.

Ĉi-jare mi iris al la IJK 2025 en Ĉisarua, Indonezio (proksime al Ĝakarto). La temo de la kongreso estis solidareco, diverseco kaj egaleco, kaj mi pensas ke ĉi tiuj estas speciale gravaj temoj por aŭstraliaj esperantistoj. Multfoje, dum la historio de nia movado, Esperanto devis barakti kontraŭ lingva ŝovinismo de naciismaj ŝtatoj, politikistoj kaj ĵurnalistoj. Aŭstralio estas lando fondita surbaze de kultura kaj necese ankaŭ lingva hegemonio super la unuaj popoloj de la lando, kaj poste, ankaŭ super ne-eŭropaj aŭstralianoj. En ĉi tiu senco Esperanto estas fremda ideo laŭ tiaj aŭstralianoj, kia Sussan Ley, kiu laŭeble kredas ke, almenaŭ en Aŭstralio, ĉiuj parolu la anglan kaj identigu sin kulture kiel aŭstralianoj.

Interese, ĉi tio tre malsimilas al Indonezio. La indonezia lingvo estas eĉ pli juna ol Esperanto. La dialekto Riaŭ de la malaja estis



Aŭstraliaj kongresanoj – maldekstre ĝis dekstre: Vere, Brendan, Bradley, Louise, Nicholas, Kaja, William



La aŭstralia/melburna tablo

oficialigita kiel la oficiala lingvo de Indonezio la 28an de oktobro 1928, sed ne multe da homoj parolis ĝin tiam. Eĉ hodiaŭ, la plimulto de indonezianoj parolas la indonezian kiel duan lingvon, ne denaskan. La indonezia estas ponto inter centoj da tribaj kaj lokaj lingvoj tra Indonezio, kaj tial estas eta versio de la fina venko! Do, je la komenco de la kongreso, mi havis du demandojn rilate al Esperanto en Aŭstralio: Kiel ni povas forigi lingvan diversecon en Aŭstralio? Kaj kiel ni povas uzi Esperanton kaj lingvan diversecon por krei etoson plenan je solidareco, diverseco kaj egaleco?

Dum la kongreso mi ĉeestis kelkajn prelegojn rilatajn al la temo de la kongreso. La unua grava prelego, laŭ mi, temis pri la Demokratia Respubliko de la Kongo, kie la komunumoj kaj familioj montras diversecon, solidarecon kaj egalecon praktike. La preleganto parolis multe pri kiel la kongaj komunumoj spegulas ĉi tiun sintenon. Ekzemplo pri tio estas la *baraza*, dometo en vilaĝoj kie homoj iras por solvi problemojn kaj certigi ke la tuta komunumo funkcias bone kaj pace. Homoj, kiuj ne partoprenas ĉi tiujn kunsidojn, estas suspektindaj, ĉar ne estas klare, ĉu ili vere volas helpi sian komunumon. Mi parolis ankaŭ kun kongano nomata Michael, kaj ni diskutis lingvan

diversecon en Kongo. Michael diris ke Kongo, same kiel Indonezio, estas lando kun pluraj lokaj lingvoj; tamen li diris, ke ankaŭ ne vere estas unu pontlingvo. Homoj multe lernas la francan en la lernejo, kaj ankaŭ la svahila estas ofta lingvo (kvankam ĝi estas malsama dialekto ol en Tanzanio, ekzemple). En ĉi tiu kunteksto Esperanto havas multe da senco, kaj pro tio multaj junuloj lernas ĝin. Tiuj estis la respondoj, kiujn Michael donis al mi, kiam mi demandis, kial estas tiom da kongaj esperantistoj kompare al en aliaj afrikaj landoj. Indas ankaŭ menci, ke malgraŭ la rapida kresko de Esperanto en Kongo, li diris ke la milito malfaciligas esperantan agadon en la lando. Ekzemple, estas malfacile gastigi kongreson kaj estas defio trovi vizojn por landoj kiel Aŭstralio, ĉar tiuj ĉi landoj kredas, ke se ili donus vizon, la konganoj ne volus reiri hejmen.

Dufoje dum la kongreso, mi ĉeestis forumon pri la Esperanto-movado en Azio kaj Oceanio, en kiuj ni parolis pri la defioj de Esperanto en niaj landoj. Kiam mi parolis kun indoneziaj kaj orienttimoraj esperantistoj ĉe la unua kunveno, ili diris, ke ilia plej grava problemo estas manko de mono, sed mi pensas ke por Aŭstralio, manko de lingva diverseco estas nia plej grava problemo. Mi klarigu: ne estas ke Aŭstralio ne havas

Daŭras >

sufiĉe da lingvoj por ke tiuj estu utilaj, sed plejparte la angla estas taksata kiel la sola utila kaj lerninda lingvo en la lando. Laŭ mi, aŭstraliaj esperantistoj bezonas krei etoson, kie ni povas lerni kaj respekti ĉiujn lingvojn en la lando.

Malgraŭ la fakto, ke Indonezio estas multe pli lingve diversa ol Aŭstralio, restas politikaj problemoj por la Esperanto-movado en Indonezio. Por protekti individuojn, mi ne uzos nomojn, sed mi parolis pri la politika situacio en Indonezio kun kelkaj indoneziaj esperantistoj. Mi ĉeestis forumon pri GLAT (mallongigo por gejoj, lesbaninoj, ambaŭseksemuloj kaj transgenuloj) en Indonezio kaj Azio ĝenerale, kie ĝi estis menciita ke la indonezia ŝtato permas nur religiajn geedziĝojn, kaj indoneziaj gepatroj kutime atendas aliseksmajn geedziĝojn kaj infanojn. GLAT-aj amrilatoj kaj genroj ofte estas malakceptataj. Ankaŭ dum jam longa tempo, la indonezia registaro batalas kontraŭ sendependiĝaj ribeloj en Okcidenta Papuo.

Dum kaj post la kongreso estis kaj estas periodo de protesto kontraŭ la indonezia registaro. Mi parolis kun indoneziano ĉe la kongreso pri la stato de la indonezia registaro je tiu ĉi tempo. Tiu diris, ke dum la festoj de la nacia tago (la 80a datreveno de la sendependiĝo de Indonezio, kiu okazis nur unu tagon post la kongreso), indonezianoj ŝajngas patriotismon sed vere malŝatas la registaron. Alivorte, subteno de la registaro ne estas vera. Tiu ankaŭ diris, ke la prezidanto estas militkrimulo pro sia pasinteco kiel generalo en la milito kontraŭ Orienta Timoro,

kaj ke li ne kapablas permesi kritikon. Kelkaj uzas ankaŭ la piratan flagon el la animeo (animeo estas neologismo por la angla kaj japana vorto *anime*-dezaĵnfilmo): “*one piece*” (unu peco), por montri malakcepton kontraŭ la registaro, kiam komenciĝis la kongreso, la flago jam estis kontraŭleĝa. Mi ofte vidas post la kongreso en la retaj afiŝoj de la indoneziaj kongresanoj, ke la protestoj daŭras, kaj la indonezia registaro forte subpremas la protestojn.

Revenante al mia unua demando pri kiel ni povas uzi Esperanton por krei solidarecan etoson, mi volas diri, ke konversacioj kiel ĉi tiuj en Esperanto estas kiel ni povas plifortigi diversecon, egalecon, kaj solidarecon en Esperantujo. Dum la kongreso ni faris ankaŭ diskuttrondon pri nia agado kontraŭ la israela genocido de palestinanoj, en niaj landoj. Esperanto povas esti ilo por internaciismo kaj lingva egaleco inter homoj kaj dum kongresoj kaj eĉ en landoj kiuj, kiel Aŭstralio, kutime uzas nur unu lingvon.

Ĉi tio estis mia unua eksterlanda kongreso, kaj mi sentis min devigata paroli Esperanton, ĉar mi ne sciis, ĉu homoj parolas la anglan aŭ ne. Tio estas bonega forto de nia movado, kaj post ĉi tiu sperto, esti esperantisto sentas multe pli nature kaj vere por mi. Kaj en Aŭstralio kaj en Indonezio, ni batalas kontraŭ malsamaj formoj de naciismo, kiuj alfrontas la projekton de internaciema solidareco kaj egaleco, kiun ni nun bezonas. Post la kongreso mi kredas ke renkontiĝoj kiel la IJK povas esti tre helpdona por ĉi tiu klopodo. **E**



La kongresa pejzaĝo

Malbonŝancaĵoj kaj malfacilaĵoj en Indonezio

WILLIAM GEORGESON (MELBURNO)

En Aŭgusto, mi kaj tri aliaj esperantistoj de Viktorio vojaĝis al Indonezio por ĉeesti la Internacian Junularan Kongreson (JK) de 2025 en la urbeto Cisarua. Mi kredas ke vi legos multe pri la kongreso de miaj kunvojaĝantoj, ĉar ni ĉiuj konsentis verki ion pri la kongreso por *ESK* – kaj tial mi verŝajne ne skribos pri ĉiu ĝenerala okazo, sed plejparte pri tio, kion mi aparte spertis.

Eble vi atendas tion, kion mi menciis en la titolo, sed mi komencos per bonaĵoj kaj ĝeneralaj aferoj. La kongreso daŭris dum semajno, kun tre plena programo. Tio estis tre malsama kompare al la kutima kongreso en Aŭstralio, kie preskaŭ neniam okazas du programoj samtempe. Plej ofte io estis okazanta kio interesis min, kaj kiam ne, mi trovis ion por fari. Alia afero kiu multe plaĉis al mi, estis la naĝejo ĉe la kongresejo. Tio estis bona, ĉar mi ŝatas naĝi, kaj bezonis la malvarman akvon en la tre varmaj tagoj en Indonezio. Mi ankaŭ ĝuis ludi bilardon dum la kongreso, kiu donis al mi oportunon babili kun multaj diversaj homoj, kiuj alie nur parolus intersiaj amikoj.

Sed, kio pri la titolo, vi eble plu demandas. Kie estas tiuj "malbonŝancaĵoj kaj malfacilaĵoj"? Kaj mi rakontos nun pri tio. La rakonto de tio komenciĝas preskaŭ tuj kiam ni alvenis en Indonezio. Bradley iris aparte al alia hotelo, dum Brendan, Nicholas kaj mi iris kune al la stacidomo por iri per trajno al la stacidomo "Suriman baru", de kie mi sciis kiel atingi mian gastejon. Ni ĉiuj ne povis kontroli mapon pro diversaj kialoj, sed certe ne estus malfacile simple eliri el trajno ĉe la ĝusta

haltejo. Problemo estas kiam ĉiu ŝildo uzas alian nomon, "BNI City", kaj estas alia proksima stacidomo, "Suriman", kiun la trajno ĉiam preterpasis. Ni pensis ke ni devis iri al "Suriman", kaj eĉ pagis taksion iri tien kiam trajnoj ambaŭdirekte ne haltis tie. Post multe da promenado, mi maltrankviliĝis, ĉar iel, ŝajnis ke mi eble maltrafus la plej malfruan alventempon ĉe la gastejo. Finfine, je 15 minutoj antaŭ tiam, ni iel alvenis. Poste mi lernis ke la stacidomo havis la alian nomon en Guglomapo, kaj la taksio fakte iris preter la strato sur kio estis la gastejo.

Post tio, mi pensis ke ĉio estus en ordo. Certe, ĉu ne? Ĉe la kongresejo? Nu... en la buso tien, miaj kruroj ne povus iri malantaŭ la seĝo antaŭ mi, pro manko da spaco. Ne estis granda problemo, sed mi estis iom malkomforta. Kiam ni atingis la kongresejon, ni ricevis informon pri kie ni dormus, kaj oni diris ke la ĉambroj estus pretaj post la 2a ptm. Iom post tiam, mi iris al la konstruaĵo en kiu mi dormus, la malnova konstruaĵo, "Salono Foxtrot", kaj tuj rimarkis malbonegan odoron en unu flanko de la granda komuna ĉambro, kvazaŭ io mortis en la muro. Mi iris al mia ĉambro, kaj la litoj aspektis kiel iu ĵus uzis ilin! Estis malorde. Mi ne sciis ĉu tio estis eraro, kaj alparolis iun pri tio, kaj la problemo estis solvita.

Unu afero kiu estis longdaŭra problemo por mi estis la manĝaĵo, ĉar ĝi estis azia manĝaĵo, kiu ne multe plaĉis al mi. Almenaŭ, post la eventoj de la tago, mi nur volis duŝi min kaj dormi – la vetero en Indonezio estas tre varma, kaj mi ofte ŝvitis eĉ dum mi faris nenion. Sed, mi

Daŭras >

trovis ke la “duŝejo” en mia ĉambro estis tute malkutima – en unu angulo de la ĉambro, la kaheloj estis iom pli profundaj en la planko, kaj estis sitelo kaj kulerego. Mi pensis, “En ordo, mi alkutimiĝos,” sed tuj poste mi elkovris ke la varma akvo ne funkciis! Mi devis duŝi min per malvarmega akvo.

Nu, ĉio aparte ne estas tiel malbona, sed entute, post tago de multaj etaj malkomfortoj, mi sentis min iom malfeliĉa. Iam, mi vidis la ĉambrojn de la aliaj viktoriaj, kiuj estis en multe pli modernaj konstruaĵoj ol la mia. Se mi sciis ke la kvalito estus tiom malsama, mi elektus unu-litan ĉambron kiel ili, kaj ne la kvar-homan ĉambron! En mia menso, mi imagis ke mi amikiĝus kun miaj samĉambranoj – sed ili nur estis tie kiam ili dormis, kaj neniam alie! Fakte mi ne amikiĝis kun tiom da homoj, ĉar multaj homoj jam konis aliajn, kaj plejparte nur parolis kun siaj amikoj.

En la dua tago, lundo, mi naĝis en la naĝejo, kaj eĉ kiam mi uzis sunkremon, mi malbone sunbrulis. Pro tio mia humoro plejparte ne pliboniĝis, kaj havi preskaŭ la saman manĝaĵon je tagmanĝo, kaj vespermanĝo refoje ankoraŭ ne plaĉis al mi. En la mateno de la tria tago, mardo, okazis la unua duontaga ekskurso, al rivero kun akvofaloj. La aliaj viktoriaj ne iris al tio, kie oni iris piede laŭ la rivero, kaj kelkfoje saltis en la akvon de altaj lokoj. Mi decidis ankoraŭ surhavi mian brakhorloĝon, ĉar mi vidis ke aliuloj faris same, sed, laŭ mia malbonŝanco, ĝi malaperis post la dua salto. Tio certe malbonigis mian humoron, kaj post kiam ni revenis, mi decidis ne manĝi tagmanĝon, kaj nur iris al mia ĉambro. Nature, la lumo subite ne plu funkciis kiam mi enŝaltis ĝin, kaj mi restis tie ĝis vespermanĝo. Tiun tagon mi ankaŭ

ricevis retmesaĝon, kiu diris al mi, ke mi ne akiris postenon por kiu mi kandidatiĝis kaj intervjuiĝis antaŭ la kongreso!

La kvara tago, merkredo, estis la tago de la tuttagaj ekskursoj, sed mi antaŭe decidis ne partopreni en tiuj, kaj plejparte ripozis dum la tago. Ajnokaze mi ne sentis min tiom bona, kaj eble bezonis liberan tempon por fari nenion. Tiun tagon mi eĉ decidis ne vespermanĝi, ĉar la ideo de tia manĝaĵo preskaŭ naŭzis min, kaj mi ne aperis en la manĝejo dum la tuta tago. Mi sciis ke la venonta tago estos la tago de la skribita C1-ekzameno, kaj decidis provi dormi frue – sed, nature, post unu horo, io vekis min kaj sendormigis min dum multaj horoj. Tiun vesperon okazis kvizo en la komuna ĉambro de mia konstruaĵo. La voĉoj estis tre laŭtaj, kaj mi dormis malpli ol kutime tiun tagon.

La ekzameno almenaŭ iris bone, laŭ mi, eĉ se mi estis nervoza pri ĝi antaŭe. Tio helpis mian humoron, ĉar mi ne plu devis zorgi pri ia ajn venonta afero. En tiu tago, ĵaŭdo, ankaŭ okazis la dua duontaga ekskurso, sed mi ne havas multe por diri pri ĝi, krom etaj plendoj pri la ĉiama problemo de neenireblaj amikcirkloj. Post kiam mi revenis kun la frue eliranta grupo, mi decidis ke mi ne vespermanĝus nenion refoje, kaj uzis poŝtelefonan aplikaĵon por mendi lokan KFC-on, kiu alvenis post duonhoru. En tiu tago mi sentis min iom pli bona, kaj en la sesa tago, vendredo, mi refoje partoprenis en multaj programeroj. Mi ankoraŭ ne manĝis tagmanĝon, sed refoje mendis vespermanĝon, ĉi-foje de loko kiu nomiĝas “Bangor Burger”. La burgero aspektis iom malbela, sed ĝi estis tre, tre bongusta, kun aŭstralia bovaĵo. Finfine, sabate, estis la fino de la kongreso. Mi pensis, ke estis iom bedaŭrinde, ĉar mi finfine komencis pli ĝui la tutan aferon!

Tamen, eĉ kiam la kongreso finiĝis, la malbonŝancaĵoj ankoraŭ ne estis finitaj.

Dum la flugo al Sidnejo, unu el miaj sendrataj aŭskultiloj falis el mia orelo, kaj mi pensis, ke tio estas iom ĉagrena, sed mi simple trovus ĝin kiam ni surteriĝos. Tamen, kiam tio okazis, mi ne povis trovi ĝin. La dungitaro en la aviadilo helpis min serĉi (ili eĉ apartigis la seĝon), sed post dek minutoj, ĝi ankoraŭ ne troviĝis. Ili diris, ke la purigistoj eble trovos ĝin. Ni iris tra dogano kaj iris por akiri niajn enirbiletojn por la dua flugo, de Sidnejo al Melburno, kaj lernis ke ni maltrafos ĝin. Almenaŭ, ili organizis ke ni povu iri en la sekva flugo, do tio ne estis tiel granda problemo. Dum ni atendis en la ĉambro antaŭ ol ni povos eniri en la aviadilo, ni babilis iom pri diversaj temoj, kaj mi plendis iom pri miaj perditaĵoj kaj malbonŝanco, kaj ŝercis pri kio alia perdiĝos. Kiam ni eniris en la aviadilo kaj mi sidiĝis, mi kontrolis miajn poŝojn, kaj rimarkis ke mia monujo ne estis tie. Mi provis paroli

kun unu el la dungitoj, kaj ŝi telefonis iun, sed poste, ni ekflugis sen novaĵo. Post ĉio, iu trovis mian monujon kaj donis ĝin al iu de Qantas, kaj ili kontaktis min pri tio. Ili iel devis uzi miajn kartojn en ĝi por trovi miajn detalojn, eĉ kiam mi donis miajn detalojn al la homoj ĉe la Melburna flughaveno, por ke ili sciu kiel kontakti min se ili trovos la monujon! Kaj ili ne eĉ intencis sendi ĝin al mi, kaj diris ke iu devus kolekti ĝin. Qantas-a servo!?

Nu, mi scias ke tio estis tre negativa, sed post ĉio, mi ne plendas. Kutime, kiam mi vojaĝas ien, mi ne havas tiom da problemoj, do tio estis nova, sed mi ajnokaze ŝatis havi la ŝancon ekkoni internacian kongreson – kaj mi scias, ke miaj problemoj ne estis kaŭzitaj de malbona organizado, plejparte nur de la loko. Eble mi povis elekti alian, pli bonan temon, sed kelkfoje oni simple havas malbonŝancon. Kaj tio – mi kredas ke indas diri – estis la plej rimarkebla afero por mi en la tuta vojaĝo. **E**

John Shaw Neilson – elstara lirika poeto de Aŭstralio

CHARLES STEVENSON (ADELAJDO)

Ĉar mia filino loĝas ĉe Penola, mi ofte vizitas ĉi tiun malgrandan urbon en la sudoriento de Sud-aŭstralio. Penola estas unu el la plej grandaj vinproduktaj regionoj de Aŭstralio, konata kiel Coonawarra. La Centro Mary McKillop, meze de la granda katolika kvartalo de Penola, memorfestas la solan katolikan sanktulon de Aŭstralio.

Tamen, por mi la allogeco de Penola estas ĝia poeto: John Shaw Nielson. Estis la nevo de la poeto, Ron Neilson, kiu enkondukis min al la poeto. La nevo kredis, ke domo en la fama Petticoat Lane de Penola estis la hejmo de la Neilson-oj.

Tamen John Shaw Nielson naskiĝis en 1872 kaj apartenis al laborista familio. Ilia luata domo, laŭ Race Course Road, estis el splitŝtipoj, kun kalkŝtona kameno, kaj mane ĉizitaj lignaj ŝindoj kiel tegmento, tenataj per ŝnurligitaj arbidaj: nun translokigita al muzeo dediĉita al la poeto. Neilson pasigis nur tri jarojn en lernejo. La ceteron de lia tempo li estis farmlaboranto. Dum adoleskeco kaj poste li faris pezan laboron – fosante kaj senarbustigante, ŝaftondante kaj vojkonstruante. Ĝi estis peza manlaboro,

Daŭras >



kelkfoje kun malbona manĝaĵo. Infektita dikfingro kaŭzis multajn ĝenojn. La familio Neilson ne povis levi sin el malriĉeco – pluvmanko, kuniklaj plagoj, kaj la depresio de 1890 certigis tion. Tamen la familianoj forte subtenis unu la alian, kaj la bonkora patro kuraĝigis la familion.

Nancy Keesing skribis, “Neilson kaj lia patro kaj la fratoj, streĉante siajn muskolojn, tordante siajn artikojn kaj rompante siajn korojn pro pionira serio de dekomence sensukcesaj malgrandaj bienoj, estis sendube kamparanoj.”

Tamen la subĉiela laboro havis riĉecon: proksimecon al la tero. Tie Neilson observis la birdojn, la kolorojn, la sezonojn. “Mi ne estis fremdulo en la lando, kie mi naskiĝis.” La poezio de Neilson estas milda, lirika, bela kaj simpla, kaj kun malofta talento por esprimi siajn sentojn kaj sian rilaton al la severa beleco de la viktoria Mallee (areo de arbust-

eŭkaliptoj). Li observis la fenomenon de la arbustaro, la kolorojn je tagiĝo. Lia kontakto kun la arbustaro kaj la naturo donis al li profunde enradikiĝintajn emociojn. “Jen la ekstazo de sunnutrita vino kaj kanto”.

Estas evidente, ke lia poezio fontis el la koro kun nenia amareco kaj nenia aludo al lia malaltranga laboro, aŭ lia humila socia rango. Prefere li skribis pri amo. Eĉ pri tragedio li skribis milde kaj kun universala superrigardo. Prenu ekzemple “La knabon, kiu ekestiĝis viro”, tragedio pri knabo, kiu dronis en rivero. La speco de frenezo akompanas “la reĝajn virojn kaj konkerintojn”, kun kiu li “eniris la rivereton”, rivereton neĝnutritan kaj tro fortan. Blankhara maljunulino lasita por vidi la viklecon de sia filo en ĉiuj knaboj kaj knabinoj en sia regiono.

Kelkaj diras, ke estas mirige, ke viro de tia severa kaj needukita fono povis verki tian delikatan lirikan poezion: “Via kanto estu delikata.” Li skribis: “La ĉielo deklaras Nenian militon – la okuloj de amantoj Vekiĝu ĉie.”

Tro multe oni parolas pri lia streĉa laboro, ĉar la eksterejo estas natura medio kun la arbustaj bruoj. La vetero en bona tago certe kondukas al laŭdo:

“Ĉu vi iam estis en mia lando, kie la arboj verdaj kaj altaj?

La tagoj estas longaj kaj la ĉielo estas alta...

Kie la birdoj faras feliĉan printempon...”

Por Neilson, la sovaĝaj birdoj estis kuraĝaj kaj saĝaj:

*“Strangaj estis la vojoj de la akvobirdoj,
En la brunaj marĉoj nokte kaj matene,
Mi konis la vojojn, kiujn ili havis en la kanoj,*

En la lando, kie mi naskiĝis.”

Daŭras >



La slabkabano de John Shaw Neilson

Li neniam povis verki kaj somere, kaj en la urbo! Lia poezio publikiĝis en la fama, vaste legata *Bulteno*. Lin dungis A. G. Stephens, viro kiu multe kontribuis al la formado de la emerganta aŭstralia literaturo. Lin forte subtenis James Devaney kaj Louise Dyer. Kiam oni komprenis, ke jen estis talenta poeto, potencaj influoj aranĝis, ke li havu agrablan laboron en Melburno. Sed lia sano ne estis bona, pro la tute peza mana laboro de liaj pli fruaj jaroj, kaj lia vidkapablo malboniĝis. Neilson, tamen, estis vaste laŭdata post sia morto en Melburno en 1942. Ekzistas bronza statuo de Neilson en la ĉefstrato de Penola. Kaj oni povas legi lian poezion en la aŭstralia antologio.

Gaje vagas kamparano dum promenado

La unua horo restas la plej dolĉa de la tago.

Gaje knabo piediras vage —

Skuante pro ĝojo, ĝoja en koro kaj membro:

Por lia ĝojo la arboj lernis paroli

Kaj ĉiuj floroj havas malgrandajn ridojn kun li

Jen la fora ĉielo, mirinda kaj malhela...

La suno estas supre, kaj Morto estas for:

*La unua horo estas la plej dolĉa de la tago. **E***



Poeziangulo

kun **KIT KELEN (MARKWELL, NSK)**

JAN DEAN (EKSE, VALO HUNTER, NSK)

Unu bonaŭgura tago *

oni trovas sin meze de arbaro
konscia pri rimarkindaj floroj, disŝutitaj
apud la pado. Lumo penetras interspacojn
en la kanopeo. Spacoj inter arbotrunkoj
lumigas elfan flaŭron, kiu kaptas vian rigardon.
Susurantaj folioj malaperas kune kun akvaj ondetoj
kaj birdokanto. Vi estas senmovigita: Hieraŭ
kaj morgaŭ estas sensencaj.

La floroj venas en ondoj:

Nun, maldense distribuitaj, poste dense.

Ilij tigoj, fajnaj kiel kotono, trompas vin pro bukloj
kaj svingoj por kredi ke ili estas delikataj.

Rememorigate pri la ovforma Lunario aŭ Monherbo
kun diafanaj paperŝeloj, ili havas la kroman efikon
de rozeco kun signetoj de violkolora kaj verda.

Iluzioj okazas per plataj petaloj interkovrantaj laŭ
papavoformo

travideblaj kaj helaj kun etaj grajnetoj ĉe la bazo.

Kiel papilioflugiloj la petaloj malfermiĝas kaj fermiĝas,
flirtas kaj petolas.

Mokemuloj povas insisti, ke la floroj ne ekzistas;
fikciaĵoj

de kreema imagopovo. Rezistu ilin kaj kuraĝu

eĉ se beleco, tiel delikata, alproksimigas onin al timo.

Ĉu oni sekretu pri la floroj, aŭ prikantu ilian laŭdon?

*Laŭ *Papilio-floroj en rozo* de Lucinda Leveille

One auspicious day *

you'll find yourself mid-forest
noticing remarkable flowers, strewn
beside the path. Light penetrates gaps
in the canopy. Spaces between tree trunks
spotlight elfin flora that grasp your gaze.
Rustling leaves disappear along with water ripples
and birdsong. You are transfixed: Yesterday
and tomorrow are meaningless.

The flowers come in waves:

Now, thinly distributed, next dense.

Their stems, fine as cotton, trick you through curls
and sweeps to believe they are fragile.

Reminiscent of the ovate Lunaria or Honesty
with translucent papery-pods, they have the
added impact

of rosiness with touches of mauve and green.

Illusions occur via flat petals overlapping in
poppy form

transparent and luminous with minute granules
at the base.

Like butterfly wings the petals open and close,
flutter and frolic.

Scoffers may insist the flowers are non-existent;
figments

of a creative's imagination. Resist them and take
heart

even if beauty, so delicate, borders on fear.

Should you keep the flowers secret, or sing their
praise?

*After Lucinda Leveille's *Butterfly flowers in rose*

Jan Dean, kiu bedaŭrinde forpasis en majo ĉi-jare, loĝis sur Awabakal-lando (Novkastelo, NSK). En 2019 Cassandra Atherton priskribis *Jan's Fish Flops kaj Flaps*, gajninto de la Microlit-Premio Joanne Burns (Ĉasisto-kategorio) kiel "rimarkindan" pro "impona regado" kaj "uzado de memorindaj bildoj". **E**



La arto desegni

JONATHAN COOPER (GOSFORD, NSK)

La ĉefa celo de ĉi tiu artikolo ne estas instrui vin kiel desegni. Anstataŭe, mi volas instigi la amon kaj aprezon de desegnado – kiel arto, kaj eble kiel ĝuiga kaj rekomenca ĉiutaga agado.

Por multaj homoj, desegnado estas kvazaŭ magio – speciala kapablo, kun kiu malgranda nombro da homoj naskiĝas. Fakte, desegnado estas natura agado. Tuj kiam oni rimarkas kiel juna infano, ke oni povas lasi spuron en sablo aŭ sur nebula fenestro, oni tion faris. Ne multe gravas, ke la rezulto estas nedaŭra. Fakte, ĝi eble estas ege maldaŭra. Desegnado esence estas rekta spuro de movado. Foje ni desegnas distrite, preskaŭ sen konscii. Mi nomas tion “desegnetado” (en la angla, “doodling”).

Tamen, se desegnado ja estas tiel natura, tiel baza, kial plej multaj plenkreskuloj ne faras ĝin? Ni atendas, ke *infanoj* faru ĝin. Kio okazas inter infanaĝo kaj plenaĝo?

Jen la etapoj de evoluo en desegnado en ĉiu homo ek de bebeco:

1. Hazarda skribaĉado.
2. Regata skribaĉado.
3. Kun kuraĝigo fare de plenkreskuloj, oni komencis atribui signifojn al tiuj markoj: bukloj kun enaj makuloj fariĝis vizaĝoj, kaj radiaj linioj el tiuj “vizaĝoj” fariĝis brakoj kaj kruroj.
4. Baldaŭ poste, oni faras rakontojn, kaj poste, pli kompleksajn rakontojn per bildoj.
5. Kiam oni vidas fotojn kaj aliajn realismajn bildojn, oni provas realismigi siajn proprajn desegnaĵojn.
6. Tio, kio poste okazas, dependas de

kiom da kuraĝigo oni ricevas de proksimaj plenkreskuloj kaj, iom, de onia natura talento. Tio ofte nomiĝas la “krizo de realismo”. Oni aŭ forlasis desegnadon, dirante, ke oni ne posedas tiun lertecon, aŭ oni trarompas kaj daŭre plibonigas siajn kapablojn.

Mi kredas, ke gravas por *ĉiuj* desegni. Kial? Ĉar **ĝuste dirite, desegni estas vidi sen nomi**.

Tre influa libro, por mi kaj multaj aliaj, estas *Drawing on the right side of the brain* (Desegni per la dekstra flanko de la cerbo), verkita de Betty Edwards. Edwards verkis pri kiel la du flankoj de la cerbo rilatas al du modaloj de pensado: La maldekstra duono estas logika, sinsekva, racia, vorta, kaj analiza (vidante aĵojn kiel sumojn de partoj). La dekstra duono estas intuicia, nesinsekva, neracia, nevorta kaj sinteza (vidante aĵojn kiel neapartigeblajn tutaĵojn).

Sciencistoj nun kredas, ke ne ekzistas tiel rekta rilato inter la du duonoj de la cerbo kaj la du modaloj de pensado, sed la ĝenerala principo ankoraŭ validas. Do, ni nomu ilin la **vorta kaj nevorta modaloj**.

Jen simpla pruvo: Nomu tiujn ses kolorojn:


verda ruĝa blua
flava nigra oranĝa

Estas tre facile, ĉu ne?

Nun, diru la *kolorojn* de la vortoj, ne la vortojn mem:

verda ruĝa blua
flava nigra oranĝa

Daŭras >



Bildo 1: Kiel la vorta modalo "vidas" homon

Ĉu vi rimarkis ian mensan konflikton?

Bildo 1 montras kiel la vorta modalo "vidas" homon (aŭ pli ĝuste, la supran parton de la homa korpo): kiel kolekton da nomeblaj partoj: hararo, okuloj, oreloj, nazo, buŝo, kolo, brakoj, torso, ktp.

Okazis interesa eksperimento, kiu estas ripetita samrezulte plurfoje. Betty Edwards petis kvar junajn mezlernantojn desegni homon (per memoro). La kvalitoj de la kvar desegnaĵoj (laŭ realismo) estis similaj unu al la aliaj. Poste ŝi petis lernantojn 1 kaj 2 kopii la desegnaĵon en Bildo 2.



Bildo 2: Pablo Picasso, *Portrait of Igor Stravinsky* 1920



Bildo 3: Ok desegnaĵoj de kvar lernantoj

Kaj ŝi petis lernantojn 3 kaj 4 kopii la saman desegnaĵon *inverse*. La rezultojn vi vidos en Bildo 3.

Lernantoj 1 kaj 2 luktis kontraŭ la krucitaj gamboj kaj la ŝajna mallongiĝo de perspektivo. Tamen, la desegnaĵoj de lernantoj 3 kaj 4 estis multe pli ĝustaj.

Kiel oni povas ekspliki tion? Jen citaĵo el *Desegni per la dekstra flanko de la cerbo*. Ĝi temas pri la tasko desegni seĝon:

‘La maldekstra duono [la vorta modalo] ne havas paciencon pri tiu detala percepto kaj diras, efektive: “Tio estas seĝo, mi diras al vi. Tio sufiĉas por scii. Fakte, ne ĝenu rigardi ĝin, ĉar mi havas pretan simbolon por vi: jen! Aldonu kelkajn detalojn, se vi volas, sed ne ĝenu min pri ĉi tiu afero de rigardo.”

Ekzistas diversaj ekzercoj por kuraĝigi nevirtajn vidadon kaj desegnadon: en ĉiu, oni donu al si mem taskojn, kiujn

la vorta modalo ne bone faras, aŭ pri kiuj ĝi ne interesas. Ekzemple, desegni konturojn sen rigardi la paperon, aŭ desegni la spacojn inter objektoj, ne la objektojn mem.

Vidi formojn de spacoj, ombroj kaj spegulaĵoj estas ekzemplo de **traviva vidadado** kontraŭ **estetika vidadado**. Traviva vidadado estas tio, kion ni uzas por navigi nian vojon tra la mondo sen frapi objektojn, fali de deklivoj aŭ esti frapata de aŭtoj. Estetika vidadado, aliflanke, estas vidi simple por la plezuro vidi, supozante nenion. Alivorte, vidi sendepende de tio, kion oni scias.

Nun, mi montros al vi kelkajn desegnaĵoj, kiujn mi faris dum la pasintaj kelkaj jaroj. Mi ne montras ilin ĉar mi havas ian specialan talenton pri desegnado, sed ĉar mi, kiel la kreinto, havas specialan komprenon pri la celo kaj tekniko de ĉiu ekzemplo.

Bildo 4 montras serion de kvar



Bildo 4: Kvar rapidegaj desegnaĵoj

rapidege faritaj desegnaĵoj, ĉiu farita dum 30 sekundoj. Mi devis esti tre selektema: mi elektis nur la ĉefajn gestojn. Ekzemple, en la malsupra desegnaĵo, mi rimarkis, ke la pozistino faras formon de cirklo.



Bildo 5: Virino kaŭranta

Por Bildo 5, mi havis du plenajn minutojn! Mi decidis montri la ĉefajn lumojn kaj ombrojn, per la flanko de grafita bloko.

Alia ebleco estas desegni nur parton, aŭ partojn, de la "objekto". Oni ne devas desegni ĉiun randon. La menso de la spektanto kompletigos la figuron.

Kiam unu linio iras malantaŭ alian (ekzemple en Bildo 6, ĉe la dekstra kruro), tio kreas la iluzion de tri dimensioj. Tio ankaŭ malhelpas la ŝajnon, ke la desegnaĵo estas nur formo, kiun oni devas plenigi per koloroj.

En Bildo 7, mi ombrumis per linioj, kiuj ŝajnas sekvi la tridimensiajn formojn de la korpo. Mi penis montri la korpon "tunelantan" tra spaco.

Oni kelkfoje aŭdas, ke helaj koloroj ŝajnas iri antaŭen kaj malhelaj koloroj, malantaŭen. Kaj, ke varmaj koloroj ŝajnas iri antaŭen kaj malvarmaj, malantaŭen. Tamen, la vero estas, ke *ŝanĝoj* de koloro (aŭ heleco) antaŭeniras kaj montras ŝanĝon de direkto. Ekzemple, en Bildo 8,



Bildo 6: Sagisto



Bildo 7: Kruroj



Bildo 8: Kuŝanta virino

vidu la ŝanĝon de heleco al malheleco ĉe la genuoj.

Komponado

Ofte, oni desegnas sen atento al la randoj de la papero. La celo ĉefe estas, ke oni havu sufiĉan spacon por la tuta figuro. Tamen, estas bone pensi pri kiel la korpo (kaj aliaj objektoj) rilatas al la rektangulo kaj al unu la alia.



9a



9b

Bildoj 9: Virino sidanta

Se tempo permesas, oni povas krei kompletan komponaĵon, por ke la situo de ĉiu formo aspektu ĝuste kaj bone. (Fakte, kelkfoje, mi desegnas rektangulon interne de la papero post kiam mi desegnis la poziston.) En Bildoj 9a+b, rigardu kiel la linio de la supro de la kruro montras al la fino de la plinto, kaj la dekstro de la tuko montras al la pordofosto.

Konkludo

Mia deziro estas, ke vi estu inspirita kunporti kun vi desegnokajeron, kaj desegni ĉiutage. Tamen, eĉ se vi ne desegnos, mi esperas, ke vi almenaŭ komencu ekzerci la nevortan modalon de via menso, por ke vi povu vidi la mondon kiel artisto, kiel desegnisto. **■**

li profitis de vojaĝo al Parizo, laŭdire por vidi la tiaman modon, kaj restis tie kun la intenco poste venigi siajn edzinojn kaj filinojn. Poste la familio migris al Aŭstralio.

Kun la helpo de samlandanoj, post pluraj provoj, li trovis bonan laboron kiel tajloro, ĝis akcidento, neatendite metis novajn obstaklojn sur lian vojon. Kiam li malgrimpis ŝtuparon kun multe da pezaj ŝablonoj en la brakoj, li ne vidis ke iu forgesis balailon tie. Li falis kaj tri vertebroj frakasiĝis. De tiam li ne plu povis labori. Sed kiel li mem skribis en sia aŭtobiografio: "La akcidento en mia laborejo invalidigis min por labori, sed donis al mi Esperanton kiel mensan okupon."

Svetislav iris al la Melburna Societo, tiam en Richmond, kaj per konversacio kun Herbert Koppel ĉiun semajnon finfine lernis Esperanton. Li ne povis sekvi la klason de Fay Koppel ĉar li ne sufiĉe bone

regis la anglan, kaj pro sia disleksio, kiu ankoraŭ tiam estis al li mistera nekapablo, ĝis kiam Donald Broadribb, la redaktoro de la organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio, *Esperanto sub la Suda Kruco*, sciigis al Svetislav, ke temas pri disleksio. Li miris ke tio havas nomon, kaj ke li ne estas la nura en la mondo, kiu suferas pro tiu handikapo. Sed scii la nomon ne kuracis lian kondiĉon.

Svetislav fariĝis delegito de UEA kaj en tiu posteno plenumis la deziron de multaj esperantistoj tra la mondo. Kiam malfermiĝis la multkultura radio 3ZZZ, li prenis la oportunon por enkonduki Esperanto-programon. Li sukcesis forigi ĉiujn barojn kaj ĝis nun ĉiun lundon aŭdeblas programo en Esperanto.

Svetislav estis amikema, trankvila homo, konata de multaj esperantistoj en la mondo pro sia laboro en la movado. Li tamen ĉiam montris sufiĉe da decidemo por realigi siajn revojn. **E**



Svetislav Kanacki

SAT-kongreso 2025

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Grava Esperanta evento, kiun mi ĉeestis dum mia restado en Eŭropo estas la kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda). Ĝi okazis en la kastelo Grezillon de la 5a ĝis la 16a de aŭgusto 2025. Estis malgranda kongreso eble pro tio ke la hakado de la retejo de SAT malpermesis fruan sciigon pri la aranĝo. Venis ĉirkaŭ 60 homoj de diversaj partoj de Eŭropo. Rimarkinde estis ankaŭ grupo de koreanoj, kiuj partoprenis plurajn aranĝojn unu post la alia, kaj esperantisto de Togolando.

Okazis la kutimaj kunsidoj por raporti pri la pasinta jaro kaj organizi la sekvan. La laboron de tiuj kunsidoj respegulas la gvidrezolucio kaj la deklaro, aprobitaj de la kongreso je la lasta tago. Prelegantoj proponis prelegojn pri tre diversaj temoj:

- *Kiu estas la posedanto de la rokoj de Liancourt inter Koreio kaj Japanio?* de Hyong-Jin Kwon.
- *Provo krei anarkiistan komunumon kun Esperanto kiel komunikilo apud Bruselo en la 1920aj jaroj* de Tabatha Fabri. Tio estas parto de pli ampleksa universitata esploro pri la historio de la laboristaj Esperanto-movadoj.
- *Rolo de la anarkiistoj en la kontraŭ-kolonia revolucio cele liberigi Makedonion de la otomana imperio,*

de Tanja Ivanovna.

- *Juĝa kaj polica subpremo en la hispana ŝtato*, de Pako Balibrea.
- *Rifuĝintoj en la insulo Lesbos*, de Annie Grente.
- *Speciismo*, de Vito Markov.

Jose Maria Salguero prezentis libron eldonita de Sateh, laborista Esperanto-Asocio en Hispanio. Ĝi estas kolekto de artikoloj, montrantaj alian priskribon de gravaj momentoj en la historio de Hispanio.

Dum SAT-kongreso tradicie ekskursoj devas ebligi la ĉeestantojn havi kontakton kun lokaj laboristoj aŭ sindikatoj. Tiu postulo estis plenumita per vizito al la ĝardenoj Cocagne en St Barthelemy d'Anjou. Ili apartenas al asocio kies celo estas socie reintegri homojn, kiuj estis forpelitaj el la labormerkato, per laboro en organikaj ĝardenoj kaj disvendado de la produktoj.

Dum la vizito al Doue la Fontaine, ni malkovris kia estis la vivo en malnovaj domoj fositaj en la lokan molan ŝtonon (tofo), nomitaj trogloditaj domoj. Kvankam nuntempe riĉaj homoj provas ilin aĉeti kaj krei ene komfortajn vivkondiĉojn, plejparto de tiuj domoj havas alian uzon; produkti fungojn, ĉar la fositaj tuneloj estas kompreneble mallumaj, malvarmaj



kaj humidaj. En aliaj tuneloj nun estas kvazaŭ muzeo, kie buntaj lumoj kaj dolĉa muziko kreas malstreĉan etoson. En alia loko, Orbieres, poldevena artisto, Jacques Warminski, en la 1980aj kaj 1990aj jaroj skulptis interalie gigantan helicon kaj galeriojn, kie eblas sperti absolutan mallumon kaj kie la sono de kantado estas mirinda.

Okazis ankaŭ distraj vesperoj kun

dancado tradicia, sub la gvidado de Christophe Collay, kiu ludis violonon por akompani la dancojn.

Arnaud Lagrange prezentis la teatraĵon *Ŝaknovelo*, bazita sur la ĉefverko de Stefan Zweig. La vetero tute favoris la renkonton. La suno brilis sed la temperaturo restis agrabla.

Venontjare la hispanaj kamaradoj preparos la kongreson en la urbo Leon. Ĝi okazos de la 19a ĝis la 26a de julio. **E**

Cele al pli sana medio

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Antaŭ nelonge la loĝantoj de la sekvaj konsilioj en Viktorio – Whitehorse, Frankston, City of Melbourne, Stonnington, Yarra, Maroondah, Manningham, kaj Moonee Valley – ricevis plian rubujon por apartigi la restaĵon de manĝaĵoj kaj la malgrandajn branĉojn kaj foliojn el la ĝardeno. Tiu rubujo ricevis la nomon *FOGO: Food Organics and Garden Organics* (organikaj manĝaĵoj kaj organikaj ĝardenajĵoj). Kial? Kio okazas al tiu rubaĵo? Kiel volontulo de la komunuma ĝardeno en Glen Oak Park (Bayswater), mi havis la oportunon viziti la entreprenon Bio Gro en la urbo Dandenong. Ĝia celo estas utiligi la organikan rubaĵon. Tiu entrepreno apartenas al la familio Van Schaik, kiu jam en la 1970aj jaroj provis transformi la restaĵon de la pinarba industrio – ĉefe la arboŝelojn – al riĉa grundo en Monto Gambier (Sud-aŭstralio). La eksperimentoj montriĝis sukcesaj kaj en 1995 naskiĝis Bio Gro. En 1998 la familio aĉetis terenon en Bayswater, Viktorio.

La procezo estas sufiĉe simpla sed longa. Ŝarĝaĵtoj kolektas la enhavon de la rubujoj, FOGO transportas ĝin al Dandenong kaj elŝutas ĝin sur la korton de la entrepreno por la ĝojo de la mevoj,

kiuj tuj nube flugas por esplori la novan amason. Per moviĝanta tapiŝo, la rubaĵo eniras ŝedon, kie staras ambaŭflanke de la tapiŝo, laboristoj. Ili devas elpreni la nedeziratajn substancojn. Plej ofte temas pri plasto, vindoj sed ne nur. Por amuzi sin, la laboristoj faras ekspozicion el la strangaj objektoj neatendite trovitaj. Baterioj estas la plej timigaj objektoj. Tiam la tapiŝo estas tuj haltigata.

Poste la rubaĵo estas dispecigita kaj transportita al Bendigo, kie ĝi estas sternita ekstere en longaj vicoj. Ĝi restas tie dum pluraj monatoj ĝis ĝi fariĝas altkvalita kompoŝto aŭ mulĉo. La temperaturo kaj la humideco estas konstante kontrolataj por atingi bonan rezulton. Ne eblas kompari kun la kompoŝto aŭ mulĉo aĉetitaj en vendejo kiel Bunnings. Por rapidigi la procezon, la organika rubaĵo ne estas ekstere kaj la temperaturo estas pli alta, kio detruas multajn bakteriojn.

Anstataŭ malŝpari valoran materialon enfosigante ĝin en rubejon, eblas uzi la naturan procezon de detruo-kreado. Nur necesas iom pli da atento kaj da pacienco. **E**

El la regionoj

NOVA SUD-KIMRIO

La 24an de septembro, Jonathan Cooper estis intervjuita pri Esperanto por *Late Night Live* (ABC Radio National) kun David Marr, kaj la intervjuo estis elsendita la 13an de oktobro. Ĝi estas nun aŭskultebla interrete (eo.org.au/lnl2025).



Ankaŭ la 24an de septembro, iuj membroj de Esperanto NSW renkontis la prezidanton de Germana Esperanto-Asocio, Martin Haase, ĉe Esperanto-Domo.



La trian dimanĉon de ĉiu monato, esperantistoj de la Centra Marbordo kunvenas ĉe la kafejo en Mount Penang Gardens. Septembre, ok membroj piediris tra la ĝardenoj kaj Joanne Cho instruis meditado.

– Jonathan Cooper

SUD-AŬSTRALIO

La sudaŭstralianoj renkontiĝis septembre per Zoom. El Eŭropo, Germanio, aldoniĝis al la grupo Levi Hickey, kiu ekde aprilo laboras tie kiel infanvartisto. Li ĝuas la sperton zorgi pri tri knabetoj kaj

pliperfektigi en la germana. Dum duonhoro li respondis al niaj multaj demandoj kaj restis por aŭskulti la prelegeton de Katja Steele pri la deklario de Montevideo, la rilatoj inter UEA kaj Unesko.



Kelkaj el la adelajdanoj renkontigis kun juna hungara esperantisto Tegze Tordai kaj lia amikino. La paro estis vizitanta amikan familian kaj la Esperanto-novulo kuraĝe kontaktis Sandor Horvath. Montriĝis, ke tiu renkontiĝo estis lia unua vera konversacio en Esperanto. Katja kaj Trevor Steele prenis la gastojn al duontaga ekskurso.



La 18an de oktobro ni okazigis en la komunumejo de Black Forest la tradician kvizon posttagmezon, gvidatan de Trevor Steele. Estis bona okazo por ĝui la personan renkontiĝon kaj ridi, diskuteti, lerni. La grupon de esperantistoj plifortigis per sia scio du neesperantistoj.


– Katja Steele

Por detaloj de grupoj kaj kunvenoj en Aŭstralio, vizitu esperanto.org.au/lokaj-grupoj.



Somero en la Suda Hemisfero

Krucvortenigmo VICKY CRICKETT (TAURANGA, N-Z)



Solve in ESK 161 (marto 2026)

Horizontale

- 1 Manĝi eksterdome, en la naturo
- 5 Unu el la plej varmaj monatoj
- 6 Granda blua ŝanceliĝanta afero, en kiu loĝas sirenoj
- 7 Dormi ekstere en tendo
- 8 Glitado sur akvo per tabulo
- 11 Festo en decembro kun donacoj kaj arbo
- 13 La unua tago de la jaro
- 16 Io freŝiga por varma tago (8,8)
- 18 Iri al aliaj lokoj por viziti aŭ ripozi
- 21 Boato kun veloj
- 22 Lumo kaj varmo en la ĉielo
- 24 Simple kuŝi aŭ sidi trankvile
- 26 Tempo kiam oni ne laboras
- 27 Verda ekstere, ruĝa interne, dolĉa frukto de somero
- 28 Por protekti la okulojn kontraŭ la suno
- 29 Moviĝanta akvo sur maro aŭ lago

Vertikale

- 2 Loko kun akvo por sin amuzi
- 3 Kuŝi en la suno por bruniĝi
- 4 Aparato por kuiru manĝaĵon ekstere
- 5 Patro, patrino, infanoj, geavoj ktp
- 9 Okazo por ĝoji kaj celebri
- 10 Ofta manĝaĵo por (1 horizontale)
- 12 Kremilo por protekti la haŭton kontraŭ la suno
- 14 Kiam la aero ne estas malvarma (5,6)
- 15 Granda ombrelo por fari ombron
- 17 Malvarma dolĉa manĝaĵo el lakto
- 19 Loko kun glitejoj kaj akvaj amuziĝoj
- 20 Io sur la kapo por protekti kontraŭ la suno
- 23 Sezono varma
- 25 Loko kun sablo

Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Kongreso kaj Somerkursaro 2026

AŬKLANDO, Nov-Zelando • 11 – 17 januaro 2026

SAINT FRANCIS RETREAT CENTRE

50 Hillsborough Road, Hillsborough 1042, Aŭklando, Nov-Zelando



Instruistoj: Moisés Herrera (maldekstre) kaj Joanne Cho (dekstre)

Por pli da informo, kaj por registriĝi, vizitu esperanto.org.au/kongreso

Agnoskoj pri fotoj

Kovrilo, 5 Josh Young per Unsplash

4 Heather Heldzingen

6 “eze cmf” per Unsplash

12–14 Bradley Steele

18 Stanley Gibson

19 Slabkabano: Charles Stevenson;
Skribilo: Alvaro Serrano per Unsplash

20 Flying Islands Pocket Poets

22 Skema korpo: Jonathan Cooper;
Pablo Picasso, *Portreto de Igor Stravinski* 1920, privata kolekto; Ok
desegnaĵoj: Betty Edwards

23, 24 Jonathan Cooper

25 Familio de Svetislav Kanacki

26 Franciska Toubale

28 Late Night Live: per Jonathan
Cooper; Centra Marbordo: per
Joanne Cho; Tegze, Zsofia kaj Trevor
Steele ekskursas: Katja Steele;
Indrani Beharry-Lall kaj Bob Felby
kvizas: Katja Steele

30 St Francis Retreat Centre,
Moisés Herrera, Joanne Cho

32 Ilia Dewi (Indonezio) kaj Teofilo
Jose Maria de Jesus (Orienta
Timoro), ĉe St Kilda dum la aŭstralia
Esperanto-kongreso, Melburno,
2015. Foto: Joanne Johns

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
0403 358 941

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

Committee Members:

William Georgeson, Terry Manley, Esther Parris

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Bradley McDonald | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**

Committee Members:

Dave Dewar, Stephen Epstein, Georgia Naish,
Lorraine Wong

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@
gmail.com
0800 350 781

“Esperanto?”

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

